

## Esperanta originala romano, laŭ Henri Vatré, 2-a parto

Claude Gacond, 69-a radioprelego, 1964.03.25 & 28

Atentu esperantistoj! Ĉi tie parolas la Svisa Kurtonda Radiostacio pri la esperanta originala romano. Vi aŭdas Claude Gacond.

Dum la pasinta elsendo ni komencis ekzameni tre interesan laboron de Henri Vatré pri la esperanta originala romano. Ni hodiaŭ daŭrigos tiun studon. Mi konsilas al vi preni kraĵon por povi noti la nomojn de la aŭtoroj kaj verkoj, kiujn vi ŝatus pli bone koni. Mi atentigas vin, ke la tutan laboron de Henri Vatré eldonos multoblige Esperanto-Edukistaro de Svislando.

« Kun la nerv-ekscitaj ardoj de la romanoj de Julio Baghy kaj Raymond Schwartz tre kontrastas la sobraj priskriboj de Engholm, kiu trankvile rakontas al ni la vivon de svedaj kamparanoj en *Homo sur tero*, verko de mirinda ekvilibro inter faktaj kaj imagitaj elementoj, inter observo kaj fikcio, inter realismo kaj poezio, konstatas Henri Vatré.

La malplej konata romano kaj tamen unu el la plej bonaj estas *Metropoliteno* de Varankin. Temas pri juna soveta inĝeniero, kiu vojaĝas al Berlino por studi la konstruon de subtera fervojo. Problemo tre aktuala : la trafiko en moderna urbo. Kiel Schwartz, la aŭtoro ne celas esti moralisto, nur moristo. Li komparas la vivon en Sovetio kun tiu en la antaŭ-hitlera Germanio.

Varankin tre lerte rakontas pri tekniko, politiko kaj erotiko. Se vi ne ŝatas la ruĝan koloron, ne legu la libron. Sed se vi ŝatas la poezion de bela virina korpo... tiam, je via servo !

La polo Jean Forge decide nin invitas en la regionon de la plej senbrida fantazio. Lia *Saltego trans jarmiloj*, inspirita de la *Tempomaŝino* de Wells, mirakle transportas homojn de la nuntempo en la epokon de Nerono. La kontrasto de du civilizoj estas sprite ekspluatita.

Alia romano de Forge, *Mr. Tot aĉetas mil okulojn*, apartenas al la plej amuza detektiva speco. Ni ekkonas en ĝi grandiozan inventaĵon, la 'televizoron', kiu ebligas spioni ĉion, kio okazas en la ĉambroj de granda hotelo. Tre moderna rakonto, plena de pulsanta vivo. Stilo bonega.

Eble la plej pure detektiva libro estas la malnova *Pro kio ?* de Argus. Okazas unue terura krimo, poste lerta eltrovado de la kriminto, kaj fine dolĉa amo.

Leginte la pli modernan *Mistero minora* de Szilagy, vi konstatos, ke en ĝi – feliĉe ! – neniuj krimoj okazis. La aŭtoro simple mistifikis la leganton, sed li tion faris kun maksimuma talento. Lia stilo pruvas intiman konon kaj ĉiutagan uzon de esperanto.

Sviso vivinta kaj mortinta en Skotlando, la tiĉinano Cezaro Rosseti, frato de Reto, verkis libron verŝajne unikan en nia literaturo, *Kredu min, Sinjorino !*, kiu restos fonto de sprita bonhumoro kaj de plej sukaj, senceremoniaj, eĉ trivialaj esprimoj. Temas pri homoj, kiuj proponas kun multe da vervo kaj gestoj tute senutilajn umojn, kaj provas tiujn trudi al gapanta publiko. »

Post tiu panorama prezento de nia romana literaturo, sinjoro Henri Vatré ekzamenas en sia interesege laboro kelkajn aspektojn de nia esperanta originala romano. Ni daŭre citu lin :

« Ni ŝuldas al D-ro Valienne la du unuajn romanojn aperintajn en esperanto : *Kastelo de Prelongo* kaj *Ĉu li ?*. Tiuj dikaj volumoj apartenas al la plej malbona speco de felietono kun krimoj, incendio, mistero, sovaĝaj amoj, sed... ili kaptas la leganton ĝis la lasta paĝo. La stilo montras ĉiujn erarojn, kiujn povas kulpi franco nereganta sufiĉe bone la lingvon.

Humuristo eble dirus, ke ekzistas tri specoj de stilo : a) la ĝene malbona, b) la ĝuige bona, c) la simple flua, seninspire korekta. Tiun ĉi lastan uzas plej ofte Luyken kaj Bulthuis, bonaj ordinaraj verkistoj sen eltsaraj kvalitoj. Ambaŭ lasis al ni po kvar romanojn, kiuj nun impresas tute eksmodaj, kiel la ĉapeloj de niaj avinoj.

## Esperanta originala romano, laŭ Henri Vatré, 2-a parto

Claude Gacond, 69-a radioprelego, 1964.03.25 & 28

*Paŭlo Debenham* de Luyken, tamen trafis cenzuran malpermeson en cara Ruslando. Bulthuis nomis unu el siaj romanoj *Idoj de Orfeo* ; poste Schwartz rebaptis ĝin *Idoj de Morfeo*. Ne maltrafe ! Fakte tro multe da figuroj kaj komplikaj okazaĵoj svarmas en tiuj libroj, kaj oni ofte emas transfoliumi plenajn paĝojn. Nuntempe oni verkas pli verve kaj koncize !

La ĉefa merito de tiuj du romanistoj kuŝas en tio, ke ili prenis la plumon en tempo de ĝenerala silento. Iliaj verkoj similas al biero, kiun oni certe trinkis plezure dum ĝi estis ankoraŭ freŝa. Kompare la verkoj de Schwartz similas al bona vino, kiu akiras plian kvaliton per la maljuniĝo, bone resumas Henri Vatré.

La sociaj problemoj priokupis plurajn verkistojn jam de la komenco. Inter la pli realismaj Engholm prezentas la viv-kondiĉojn precipe de svedaj infanoj en industria regiono. La hungaro Emba (Baranyai), en *Maria kaj la grupo*, faras pesimisman kritikon pri loka esperanta movado. Tre bona stilo, vervaj dialogoj, trafaj esprimoj, sed bedaŭrinde tute mankas humuro kaj vera satira sento.

Alia verkisto de proleta tendenco, Weinhengst, pentras en *Turstrato 4* la plej mallumajn angulojn de nia socio kun profunda realismo. Li tre objektive rakontas pri la sorto de l' falintoj de l' vivo. Li montras materian kaj animan mizeron en flua, tre simpla lingvo.

Tiuj tri lastaj aŭtoroj bone perceptis, ĉiu en sia maniero, la socian dramon akriĝintan inter la du mond-militoj. En la jaroj tridekaj prepariĝis unu el la plej teruraj koŝmaroj, kiujn travivis la mondo. »

Venontsemajne dum tria kaj lasta elsendo ni daŭrigos la ekzamenon de la laboro de Henri Vatré pri la esperanta originala romano. Ni esperas per tiuj kelkaj elsendoj pri nia literaturo, ke ni vin instigis legi aŭ relegi niajn originalajn verkojn kaj interesiĝi pri nia kulturo.

Nome de la Svisa Kurtonda Radio-Stacio Claude Gacond diras al vi : Ĝis reaŭdo !

-oOo-